


LA VERDA LUPEO



3 (82) **INFORMILO DE ELF-AREK** 22a jaro * 1990 *

Offizielles Organ der ArGe ESPERANTO im BdPh e.V.


Absender



Postk



Rudolf Burmeister
W.-Fiel-Str. 30
Karl-Marx-Stadt





Privata tutajo GDR 64 kun sta GDR 41





UTK de 75a UK en Habano (C)

NIA ADRESARO *** NIA ADRESARO

Adresŝanĝoj

Jeannine Vincent, 86bis, rue Milngavie, F-49150 Baugé.

John T.Dale Jr., P.O.Box 9182, McLean VA 22102-0182, USA

Jia Jungcheng, Gan Quan 3 Cun 242 Hao 403 Shi, Shanghai, TJ-200061

Werner Simon havas novan ZIP (poŝtkodo) 38120

Revenis LVL de Francisco Deménech Torregrossa. Kiu scias la novan adreson?

Kiu havas kontakton al Karpaţi en Israelo ?

Pluraj al li senditaj leteroj restis senrespondaj. Eble iu el inter niaj geamikoj ankoraŭ havas kontakton kun li kaj scias lian novan adreson. Bv. sciigi ĝin al la redaktoro aŭ al Ivar Paulsson.

NI PRI NI ooo NI PRI NI

Pago de membrokotizoj 1989/1990

Por la ekspedo de la LVL mi ricevis de kolektamiko Paulsson novan membroliston de ELF-AREK. Laŭ tiu listo ni momente havas 154 membrojn. La membrokotizon por 1989 ĝis nun ne pagis: 10 membroj kaj la kotizon por 1990: 46 membroj. Mi devis konstati, ke estas plorinda afero, ke iuj kolektamikoj tiel honorigas nian laboron. Tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis la kotizon aŭ por 1989 aŭ por 1990, trovas en la nuna LVL ruĝan paperstrion. Bv. tuj kontroli kaj kontakti kolektamikon Paulsson, ĉar vi ne plu ricevos LVL-No. 4 ĉe nepago. Kiel ekzemploj mi listigas ĉi-tie la landojn, kie estas la plej multaj nepagintoj. Klarigoj: (8)=la membrocifero de la koncerna lando, nepagita (89), nepagita (90):

A:	(3)	(90)=1	ROK:	(3)	(90)=1
B:	(5)	(89/90)=1	C:	(2)	(90)=1
BR:	(3)	(90)=2	MEX:	(1)	(89/90)=1
BG:	(4)	(90)=3	NL:	(9)	(90)=1
CS:	(10)	(89)=3; (90)=5	PL:	(7)	(90)=2
TJ:	(21)	(89)=1; (90)=5	RO	(1)	(90)=1
F:	(17)	(89)=1; (90)=5	SU:	(7)	(90)=5
D:	(12)	(90)=5	S.	(10)	(90)=1
H:	(5)	(90)=1	US:	(7)	(89)=1; (90=4
I:	(7)	(90)=1	ZRE:	(1)	(89/90)=1
J:	(4)	(89/90)=3			

Mi esperas, ke tiuj, kiuj ankoraŭ ne pagis, nun rapide plenumos nian peton. Alie ili, kiel jam dirite, ne ricevos LVL-no:4.

Novajoj

Vi certe jam rimarkis, ke sur la titolpaĝo unu linio estas germanlingva. Ekde tuj tiuj germanaj klubanoj, kiuj estas membroj de la Germana Filatelista Asocio , nun estas kunigitaj en ĝia nova laborgrupo (ArGe) ESPERANTO. Kompreneble ĉiu membro devas pagi malgrandan jarkotizon, sed por ELF-AREK ni ankaŭ havas avantaĝojn. De ĉiu numero de nia LVL ni devas liveri al la germana filatelista asocio 28 ekzemplerojn. Por 18 ekzempleroj ni ricevos financan subtenon. Krome, post certa tempo, mi ankaŭ petos pri financa subteno por la eldono de nia nova katalogo ktp. Eksterlandaj ELF-AREK`anoj ankaŭ povus aliĝi, se ili estas membroj de FIP.
Petu pliajn informojn de mi.

R. Hirsch

STAMPOBANKO * IRK · £$ *

Oferto 2/90 de nia stampobanko

GDR	40 Leipzig	1 IRK	
GDR	41 Brandenburg	1 IRK	
F	56 Nice	3 IRK	
YU	43 Durdevac	1,5 IRK	
N	5 Hamar	2 IRK	
PL	135 Bialystok	3	
E	32 Sant Cugat	1 IRK	
AF/CS	Straznice	1,5 IRK	
E-pm	BG 90	1 IRK	
	kvarbloko	4 IRK	

H	112 Budapest	1,5 IRK
H	113 "	1,5 IRK
H	114 "	3 IRK
H	115 "	1,5 IRK
H	116 Zalaergerszeg	1,5 IRK
H	117 Budapest	1,5 IRK
	---TUT 90---	1,5 IRK
E-pm	C 90	2 IRK
	kvarbloko	8 IRK

Ĉinaj stampoj: Multaj novaj! Simpla pk aŭ kov po unu IRK.
Sur spec. kov po du IRK

Bv. kontakti la estron de nia banko: Werner Heimlich
Fröbelstr. 4
3040 Soltau

Postĝiro-Konto 16 504-308
Postĝiro-Amt Hannover
Bankkod-no: 250 100 30

LASTMINUTE...

La redaktoro dankas...

... al ĉiuj klubaj geamikoj, kiuj lastatempe trovis bonajn vortojn pri nia novstila LVL, kaj al tiuj, kiuj sendis kontribuajon al la enhavo de nia LVL al la redaktoro.

Ankaŭ mi dankas pro la al mi senditaj leteroj. Hirsch

EKSPOZICOJ KAJ NI

Bronza medalo en BRAPEX 89 (BR)

Gert Drucker sciigis, ke Elvizio Bueno Rodrigues partoprenis kun sia Esperanto-filatela ekpozajo en la pm-ekspo BRAPEX 89 kaj akiris tie bronzan medalon. Ni gratulas al li!

Vermejlo por via redaktoro

Dum Pentekosto en la FRG-urbo Leer okazis kvarlanda filatela ekspozicio (GFR, GDR, NL, SU). Inter la ekspozaĵoj ankaŭ estis tiu de via redaktoro pri historiaj faktoj en la E-movado. La ekspozaĵo ricevis la vermejlan medalon. Mirigis min, ke vere la medalo konsistis el pura arĝento (999) kun pezo de 28 gramoj.

KLUBANOJ SURVOJE •••

Goslinga en Ĉinio

Mi ricevis salutkarton de Goslinga (NL) el Ĉinio. Li skribis, ke li vizitis plurajn klubajn amikojn en tiu lando, i.a. Ding Shihui.

V. Bujak (SU) ĉe Li liang (TJ)

Liang skribis, ke li havis viziton de V. Bujak.

Redaktoro ĉe Vana (CS) kaj Straif (A)

Mi profitis la lastajn tagojn de la ekzisto de GDR-mono por fari vizitojn al niaj klubaj amikoj Vana kaj Straif. Portis min tien kaj reen la "plej fama aŭto de la mondo: TRABANT". Kun ambaŭ amikoj mi havis tre interesan konversacion pri nia temo kaj ili montriĝis tre gastamaj kaj helpemaj. Koran dankon al ambaŭ!

Hirsch (D) ĉe Straif (A)

Dum la pm-ekspozicio en Linz (A) nia klubamiko Hirsch ankaŭ vizitis la klubamikon Straif, kiu loĝas en la proksimeco de Linz.

STAMPOJ ——— OOOO

RA 10 - 49a NK - aldona informo

Post la Belucci-informoj en julio venis letero de Drucker. Li skribis, ke informoj pri tiu sta aperis en la "Bulteno de Argentina E-Ligo". La sta sur pk estas sufiĉe kosta: 4 IRK! Nia Drucker pretas sendi ĝin kontraŭ pago de 4 IRK. Li tian sumon devas pagi al la komercisto.

RA 2+3 - 11a NK en Rosario -

XI CONGRESO ARGENTINO DE ESPERANTO



ROSARIO 30 Y 31 MARZO 1 Y 2 ABRIL 1961

Ankoraŭ ne fine estas solvita la enigmo(j) pri la sta RA 2+3. Por RA 2 mi nun ricevis jenajn datoj: C.Central 05-15 03, Cordoba 18 03-02 04, Rosario 20 03-02 04. Kiu povus sendi fotokopiojn?

Hirsch

BG 29 - 42a NK en Šumen



Mi trovis ĝin sur ĵus ricevita tutaĵkoverto. Supozeble temas pri pošta memorstampo el la urbo Šumen. Tie tiu kongreso okazis. Tiu ĉi urbo posedas florantan E-movadon kun pluraj kluboj kaj eĉ kun propra pompa kunvenejo. Mi ankoraŭ ne perdis la esperon, ke atingos min iuj informoj de niaj bulgaraj klubaj geamikoj pri tiu ĉi sta lige kun ĝia tutaĵo, kaj pri la aliaj lastaj bulgaraj E-filatelaĵoj.

BG 28 Vraca

Detalaj informoj venos en la venonta LVL.
Nur post la redaktofino ni ricevis la informon.

korekto de la numerado de la sta de BG

25-1	Sofia	1989 02 12	100 jarojn E-movado en BG	O
26	Sofia	1990 18 01	100 jarojn E-movado en BG	ms
25-2	Sofia	1990 23 02	100 jarojn E-movado en BG	O
27	Šumen	1990 29 06-01 07	42a NK	O

La 100-jara E-Jubileo en Bulgario

Lastatempe atingis nin pluraj bulgaraj jubileaj filatelaĵoj. Pri ili vi jam legis en LVL 81. Sed klarigoj tute ne alvenis. Ekz. Hirsch aldonis sub "Lastminute", p. 6, informon pri al mi ne konata aperaĵo . Tiun li akiris de ne-esperantista komercisto. Nun mi almenaŭ trovis hazarde la gazeton "Bulgara Esperantisto", okt. 1989. En ĝi estas artikolo: "Al la jubileo -plenforte" de Kunĉo Valev. Jen eltiraĵoj: "...La unua E-klubo en Bulgario estis fondita en oktobro 1889....la kvara en la mondo post la kluboj en Nurembergo, Moskvo kaj Odeso. Iniciatinto estis Miloslav Bogdanov. Li ankaŭ komencis eldoni la gazeton "Mondlingvisto" (decembro 1889) kaj preparis la unuan lernolibron. Por inde celebri tiun jubileon, la oficejo de CE de BEA akceptis planprogramon. Tiu i.a. antaŭvidas proponon al la bulgara MPT pri aperigo de jubilea E-pm kaj ellaboron de nova E-insigno...." Jen kion ĝis nun ni trovis pri la jubileo:

E-pm de 10 stotinkoj	eld. eble	23 02 1990
E-sta jubilea	kun dato	01 12 1989
E-sta jubilea (variaĵo)	kun dato	23 02 1990
E-ms-sta jubilea	kun dato	18 01 1990
TUT-Kov (nur teksto)(LVL 81, p.6)	kun dato	02 12 1989
TUT-kov (kun pm-bildo)/(LVL 81 tit.-p.	kun dato	23 02 1990

Vere stranga afero estas, ke la eldonaĵoj kun dato el decembro 1989 plej laste, nur en juni 1990, konatiĝis al ni. Mi vere iom bedaŭras la situacion de niaj bulgaraj klubaj geamikoj,

kiuj eble plej laste ekscias pri bulgaraj E-filatelaĵoj, kvankam ŝajne ekzistas en BEA klubo de kolektantoj.



BG 25-1 dato supre



BG 25-2 dato sube










BG 26 ms

La ĉinaj stampoj

Zorgoplenaj estas la leteroj de niaj klubaj geamikoj koncerne la evoluon de la sta-aperado en PR Ĉinio. Jam ne plu eblas voli esti "kompleta". Ankaŭ mi perdis la esperon voli komplete trovi ĉiujn al mi mankantajn ĉinajn sta. Tamen! Ripete mi devas esprimi nian grandan dankon al nia kluba amiko Ĉin Kajĝi, kiu preskaŭ komplete savis nin el tiu mizero, ĉar almenaŭ li konstante informas pri preskaŭ ĉiuj novaperintaj sta kun bone fotokopie dokumentitaj bildoj. El liaj leteroj kelkfoje ankaŭ rimarkeblas lia honto pri iuj sta, kiuj vere ne, pro la aspekto ofte terura, estas bona reputacio por nia E-movado. Pli sube vi trovos denove kopiojn pri novaj malnovaj "sta". Tiuj subite aperas, sed ne povas konvinki pri vera "poŝteco", ĉar mankas poŝtuzitaj ekzempleroj. Komprenebie estas mia devo, transdoni tiujn informojn al vi, eble eĉ ĉe iuj el niaj geamikoj troviĝas originaloj. Se estus tiel, bv. nepre informu min, kun kopio de la tuta koverto aŭ pk!

TJ A 1 (?)



Nia Ĉin Kajĝi skribis al mi: "...Lastatempe estis trovita en Ŝanhajo poŝte (?) uzita E-stampo el la jaro 1959. Uzita ĝi estas okaze de la 10a datreveno de la liberigo de la urbo Changshu kun la dato: 1959.04.25.
Desegnis ĝin siatempe Zhang Linrui. Sur la stampo estas ĉinaj ideogramoj kaj hanlingva fonetiko (ne kun Esperanto-teksto). Kaj klare videbla E-stelo en la eta bildo. Bedaŭrinde la kopio estas tre malbone videbla..."
Kio nun? Ĉu ĝi apartenas al niaj E-stampoj, ĉar klare videblas E-stelo en la stampo? Kaj nur ĝi sen iu rilato al E.... Mi lasas la diskuton al vi. Krome necesus klarigaj vortoj de Zhang Linrui pri la kialo de apero de tiu E-stelo en la sta.

Opinio de Hirsch: Se ni jam enprenis la sta "40-a datreveno de la liberigo de Changshu,",TJ 89, tiam ni ankaŭ enprenu tiun sta. Kompreneble, ke ni nun ne denove ordigos la numerojn de Ĉinujo, sed ni donu al tiu sta la numeron: TJ A 1, se ĝi estas poŝta.

| TJ 5A-100-jara Jubileo de E... |

stilizita "UK 71



Pri ĝi Ĉin Kajĝi skribis: "... s-ano Tenf (Xie Shaoxing) sendis mane kopiitan poŝtan En la klare videbla dato legeblas: 1986 7 26 kaj en tiu tago estis uzitaj stampoj por la 71a UK. Kiu el ni posedas tiun stampon sur poŝte uzita koverto aŭ pk? Nur eblas pledi por enkatalogigo, se ekzistas pruvo pri ĝia poŝteco. Por tio ne sufiĉas permana desegnajo. Tio validas ankaŭ por la sekvaj stampoj.

| TJ 76A-110 jaroj de ĉinaj pm kun drako |



Uzita de la poŝta fako en la urbo FUJIN, 1988 07.08 okaze de "110 jaroj de ĉinaj pm kun drako". Desegnis: Fu Rongcai. Kvalito de ĝia aspekto estas akceptebla. Mirigas, ke la sekvaj du stampoj estas de la sama desegnisto.

| TJ 105A - Nacia festo - |



Uzita de poŝta fako en FUJIN kun la teksto: NACIA FESTO kaj la dato 1989.10.01..

| TJ 90-02 A - Ĉevala Jaro - |



La supre menciita numero ne estas la kataloga numero, sed n-ro de la informo pri ĉinaj stampoj en nia LVL. Same malbon-aspekta. Mi supozas, ke trančita el linolo aŭ gumo permane! Tamen, laŭdire la sama desegnisto kaj uzita de poŝta fako en FUJIN en la tago 1990.01.05. Mi persone pledus ankaŭ en ĉi kazoj, katalogi TJ 105 A kaj TJ 90-02A nur post pruvo de poŝteco.

TJ 90-07 A -Ĉevala Jaro-



Kajĝi skribis: ...Tiu-ĉi stampo estis uzata de la poŝta fako en WEIHUI kun la dato: 1990.01.05 okaze de la"ĈEVALA JARO". Centre ĉina antikva ideogramo por "ĉevalo". Desegnis: Zhang Yuanqing. ..."Laŭ alia informo tiu sta estas neposta. Komplika afero ĉu ne!? Dankon al nia Kajĝi pro supraj informoj pri novaj stampoj. ankaŭ tiujn liveris Kajĝi.

(TJ 148) 90-21 - Filatela Ekspozicio -



"La 3a Filatela Ekspozicio de Jingmena junularo pri sporto" tekstas tiu stampo, ronda kun la dato: 1990.5.1-4. el Jiangmen. Desegnis: Xie Shaoxing.

(TJ 149) 90-22 - Flugpilka Superkonkurso -



LA MONDA VIRINA FLUGPILKA SUPERKONKURSO DE ZHENGXIAN POKALO" estas la teksto de tiu stampo el Jiangmen kun la dato: 1990.05.19.Desegnis: Xie Shaoxing. (flugpilko = retpilko).

De TJ 148 + 149 mi nur posedas fotokopiojn. Pruvekzempleroj ankoraŭ mankas. Koran dankon al nia Ĉin Kajĝi pro la supraj informoj.

(TJ 150) 90-23 -IAKSTE



La 3a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en E. okazis en Beijing la 25an ĝis 30an de majo 1990. Temo de la konferenco: "Scienc-Teknika Progreso kaj Mond-Ekonomia Kunlaboro". Memore al la konferenco la Pekina Xi qu-a PTO kaj Pekina EA kune emisiis memorkoverton kaj PTO uzis memorstampon. Desegnis ambaŭ Zhang Shuxian.

Tiu grafikisto ankaŭ faris sta kaj kov por la E-kongreso en Kunming 1985! La sta aperas en du variaĵoj: presita sur la memorkoverto kaj mane stampita. Mezuroj: 35 kaj 32 mm. Mia memorkoverto posedas pm stampitan per normala datstampo. La "memorstampo" troviĝas apud la marko. Cetere tiu memorkoverto oficiale denove levigas la demandon, ĉu temas pri "tutaĵo" aŭ ne? Laŭ mi jes, ĉar poŝte oficiale eldonita.

Opinio de Hirsch: La termino "tutaĵo" estas en ĉiuj tutaĵ-katalogoj klare definita. Mallongigite la klarigo tekstas jene: "Tutaĵo estas poŝtoficiale uzeblaj formularoj kun surpresita, antaŭpagenda valormarkoj (pm) aŭ valorstampoj, kiel ekz. kovertoj, banderoloj, kartleteroj, poŝtkartoj, poŝtmandato-formularoj. Pli malofte oni uzas ankaŭ aerogramojn k.a.. Do, laŭ mi tiuj memorkovertoj kaj ankaŭ memorpoŝtkartoj (sen surpresita pm), kvankam oficiale eldonita de la poŝto por ni normalaj kolektantoj ne estas kolektindaj. Tamen, ekzistas ankaŭ interesuloj por tiaspecaj aĵoj. Por ni tiuj kovertoj kaj poŝtkartoj surhavante iun specialan stampon, povas esti dekoraĵo en nia(j) kolekt(j).

| (TJ 151) 90-24 -IAKSTE-ms - |





Meritas nian koran dankon nia aktiva Cao Xionglin. kiu sendis ĝin al la redakcio. Temas pri maŝin-aspekta-stampo, ĉar ĝi estas tre larĝa. La 25an de majo 1990, je la inaŭgura tago de IAKSTE la nanchang-a Poŝtmarka Kompanio uzis tiun stampon. Desegnis: Mao Hongzhen. La sta konsistas el dekstra tekstparto en E kaj maldekstra datstampo, kiu tamen ankaŭ montras la emblemon de IAKSTE kun E-stelo. Dankon ankaŭ al Kajĝi, kiu sendis informojn pri ĝi

| Nepoŝtaj ĉinaj sta |

Nia Ĉin Kajĝi informas: "...Antaŭ kelkaj tagoj informis min mia amiko Tenf, ...ke iuj el la de li desegnitaj E-stampoj estis uzitaj nur de filatelaj kluboj. Kaj ĉar filatela klubo aŭ asocio estas nepoŝta instanco, ne eblas paroli pri poŝtaj stampoj...". Temas pri la sekvaj stampoj:

89-46 (sur titolpaĝo de LVL 80) el Xinhui

90-10 (sur p. 8 de LVL 81) el Xinhui



kaj la feliĉe ankoraŭ sennumera stampo pri "Nigra Penco".Vd. apudan bildon" Dankon al Ĉin Kajĝi pro tiuj ĉi informoj!

| E 31 regiona kongr. Benecasim (Valencio) supl. informoj |

Nia kluba amiko Emilio Folgado Lopez sendis informojn pri la eldonaĵoj de tiu kongreso. La kongresa komitato aperigis memorkoverton kaj memorkarton. La barcelona filio ALFIL krome eldonis ilustritan koverton. La filatela ekspozicio en la kadro de tiu kongreso duone konsistis el E-filatela kaj duone el ĝeneralfilatela materialo. (vd. ankaŭ LVL 81 paĝo 11).

| E 32 -50-a Hispana Kongreso- |

Nia kluba amiko Josep Cervello, Terrassa, sendis al la redakcio salutkarton el la "50a ORJUBILEA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO" kun la dato en la ovala stampo: 11-13 Julio 1990 el la urbo SANT CUGAT DEL VALLES. La sta montras kvinpintan stelon kaj du turojn sur monto. La sta troviĝas sur bela kongresa bildkarto. Tiu montras la muran rozon de la preĝejo Sant Cugat kaj la tekston: "50-a Jubilea Hispana Kongreso de Esperanto".



| H 116 - Hungaraj fervojistoj kongresas - |



Estis ĉi-foje nia Vilmos Radnai, kiu unua informis pri ĝi. En la urbo ZALAEGERSZEG okazis 30.06-01.07.1990 la "26a Tutlanda Fervojista Esperanto-Renkontiĝo". Tio estas la teksto en la rektangula sta. La sta montras pasintjarcentan lokomotivon kaj la kroman tekston: "100 jara estas la fervojo" (en E kaj en la hungara).

Nia Radnai pretigis vicon da dekoraj kovertoj, supozeble ankaŭ dekorajn kartojn, porokazajn glumarkojn kaj kalendaretojn. La sta posedas la daton: 1990. 06. 30.

| H 117 -Kultura Festivalo- |



Stefano Fekete sendis leteron, kiu posedis poŝtajn E-stampojn pri la "FESTIVALO DE INTERNACIA KULTURO" kun la dato: 1990.07.05 el Budapest. Tiu festivalo okazis 4-9.7.1990. Kiu deziras scii pli pri ĝi, bv. legu la "Budapestan Informilon", kiu certe posedas raporton pri ĝi.

| ROK 2 (2 variaĵoj) |





Nia Amouroux sendis al ni kopiojn pri ili kaj atentigas pri 2 tipoj: Iom malsamas la datindikoj. La maldekstra estas flavverda, la dekstra violkolora. La maldekstra posedas la daton: 1989 10.14 kaj la dekstra: 1989 10 14 (sen punktoj kaj pli granda spaco inter 10 kaj 14.)




IDO ankoraŭ vivas!!

Nun aperis la dua sta por renkontiĝo de Idistoj. 1923 ili uzis la unuan sta por la Ido-kongreso en Kassel kaj nun, 1990, por renkontiĝo en Waldkappel (35 km for de la loĝloko de Hirsch). Iniciatoro estis la famkonata poŝtmarkvendisto, Idisto kaj Esperantisto, Neussner.

Pliaj informoj pri IDO en LVL 4.

C 7 -UK en Kubo-



En LVL 80, paĝo 11, vi trovas informojn pri la kongresa pm. Hodiaŭ mi postliveras informojn pri la UTK. Mi akiris ĝin en la CO de UEA okaze de mia viztito tie. En UEA tamen ĉiuj E-filatelaĵòj estas tro multekostaj kompare al la prezoj de la normala filatela merkato.
Do: C 7 ni renkontas sur UTK, ĝi posedas ovalan formon. Teksto: 75 CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO PRIMER DIA HABANA 6/ 7.3.90. La plaĉa UTK montras la kongresan palacon kaj la nomon de la gravuristo (desegnisto?) Miguel A. Penate.
En la kadro de la UK ankaŭ denove okazis ELF - AREK kunveno, sed certe en tre loza formo pro tio, ĉar niaj Kosieniak kaj Hirsch ne estis surloke pro familiaj problemoj. Eble nia kluba amiko so gilsu(averto! Li ne ŝatas alkoholaĵojn!) gvidis la kunvenon.



C 8 -75a UK en Havano -

Jes, aperis poŝta kongresa stampo, sed bedaŭrinde iuj kubanaj poŝtistoj komplete ruinigis la bonan intencon de LKK kaj certe ankaŭ de MPT. Per terura rulstampo de "CUBA OF CAMBIO AEREO" en diversaj tagoj (ni trovis datojn: 21, 23 kaj 25 07 90) ili komplete runigis la memorstampon, kaj samtempe la poŝtmarkon. Almenaŭ sur al vere "poŝtitaj" sendaĵoj". Ni tre dankas kompreneble kore al Elda Dörfler kaj Goslinga pro la senditaj salutkartoj. Ili certe ne supozis pri la fiagoj de iuj kubaj "poŝtistoj". Jen klopodo pri klarigo de la aspekto: Temas pri mssimila stampo, maldekstre tekstoparto, bone legebla en la kopio, dekstre ronda datstampsimila memorstampo (!) kun la teksto:

MUSEO POSTAL-75 CONGRESO UNIVERSAL DE ESPERANTO -HABANA-

10-7-90.
zo terglobo korno. La cevitaj sur dekoraj kun deseg-desegnisto ante pri la Muzeo. Ili Mi certas, da Dörfler ga sendos gajn informpio pri lepo al la



En ĝia mekun poŝta stampoj ritroviĝas poŝtkartoj naĵo de la Miguel Pe-Kuba Poŝta numeritaj. ke niaj El-kaj Goslin-kompleti-moj kun ko-gebla stam-redaktoro. kaŭ infor-

Kaj eble anmon pri eventuale okazinta kunveno de niaj klubaj geamikoj.

N 5 -42a IFEF-Kongreso en Hamar-

Estis nia Germano Gimelli, kiu informis min pri tiu ĉi sta. Li partoprenis tiun 42an kongreson de IFEF en la norvega urbo Hamar. Tiu urbo por la dua fojo gastigis IFEF-Kongreson. Jam 1965 kongresis IFEF tie. Gimelli skribis, ke la poŝtoficejo funkciis en la tagoj: 2a; 5a kaj 7a de julio 1990. Tiujn datojn posedas ankaŭ la sta. Pri la kongreso informas INTERNACIA FERVOJISTO 3/90. Informon pri eventuala glumarko ni ne ricevis. (bildon vd. LVL 81, paĝo 14.



La ĉina E-stampo TJ 73 ligita kun la ĉina p.m, eldonita okaze de la sama aranĝo.

TUTAĴOJ • TUTAĴOJ

Aŭstra tutaĵo el la jaro 1918

Estas nia klubamiko Amouroux, kiu posedas tiun tutaĵon. Jam antaŭe estis detale raportita pri ĝi en LVL. Bedaŭrinde ĉiam mankis la bildo de ĝi. Temas pri tutaĵo kun la surpresita 8 halera pm kun la portreto de la imperiestro Karl I.. La surpreson prizorgis la tiama "Unua Esperanto Unuiĝo de Vieno". La eldonkvanto ne estas konata. Do, tiu tutaĵo apartenas al la kategorio C de la tutaĵoj. Ĝi ankaŭ aperos en la nova tutaĵkatalogo de Hirsch.




Aŭstralia IPA-tutaĵoj en du variaĵoj-

Tiu koverto kun la surpresita 36-cenda pm (SERVO PER AMIKECO) ekzistas kun kaj sen surpreso pri la renkontiĝloko Adelaide. La kov kun aldonita renkontiĝloko ankaŭ posedas surstampitan numeron. La mia posedas la numeron 1359, ekzistas do certe pli granda eldonkvanto ol nur mil ekzempleroj. Informojn kaj bildojn pri tio vi nun ankaŭ trovas en la Hirsch-Katalogo de 1990 en la parto "IPA".

Aldono de Hirsch: Laŭ oficiala informo de la laborgrupo POLICO en la Germana Filatelista Asocio estis presita por IPA 1000 numeritaj kovertoj. Por kiuj celoj la resto estis destinitaj ne estas konata.

Nova tutaĵo el Bulgario

Jam estis preta la manuskripto por tiu ĉi LVL kaj okazis, ke mi vizitis mian samurban E-amikon. Li surprizis min per donaco de ĵus ricevita bulgara koverto. Temas pri tutaĵkoverto pri la 42a K O N G R E S O DE BEA. Tiu okazis en Ŝumen 29.06-01..07.1990. Ke la violkolora kongresa sta kun la E-stelo estas poŝta, ni nur povas supozi, manke de informoj el Bulgario.



NOVA KATALOGO - NOVA KATALOGO

pm-parto pretas

Komence de julio 1990 ĝi atingis la mendintojn. Sur 34 paĝoj vi trovas notojn pri ĉiuj ĝis nun aperintaj E-pm. Ni devas estis tre dankemaj al nia kluba amiko Hirsch, kiu per pretigo de tiu ĉi parto plu kompletigis nian "Grandan E-Filatelan Katalogon". Estas notitaj ankaŭ momente aktualaj Michel-katalogaj prezoj. De la katalogaj numeroj laŭ Michel kaj Yvert kelkaj numeroj mankas. Kiu povus liveri ilin? . Poŝtkartoj kun surpresitaj E-pm ne aperas en tiu ĉi katalogo, sed en la sekvonta parto pri tutaĵoj. Du aldonoj de la pm-katalogo informas pri "Poŝto de militkaptitoj" kaj "Milita Poŝto", la dua aldono informas pri "Krome ekzistas...". La katalogo pri E-pm kostas DEM 19,60 aŭ 14 IRK. Eblas ankaŭ ĝiri tiun sumon , kun la adreso de Hirsch, al:

Post-Giro-Amt Frankfurt/Main, banka kodo: 500 100 60
konto-numero: 3308 95-609

Nia amiko Hirsch pretas akcepti intersanĝe, sed post antaŭa interkonsento, esperantaĵojn de tiuj, kiuj ne havas la eblecon pagi.

NUMISMATIKO - NUMISMATIKO

Esperanto-moneroj el Kubo

Eble nur estas malmultaj inter ni kun intereso pri kolektado de medaloj kaj moneroj. Tamen, en la jubilea UK en Varsovio mi vidis multajn Esperantistojn, kiuj aĉetis la polajn E-monerojn. Nun okazisen Kubo nia UK. Denove nia Hans Jankowski sendis informojn kaj kopiojn pri ili. En LVL 80 jam ni montris la arĝentajn 5-peso monerojn, hodiaŭ ni postliveras la 1-peso moneroj kun averso kaj reverso. La monerojn oni vendas en la Libroservo de UEA kontraŭ 7,50 aŭ 75 guldenoj. Aperis ankaŭ t.n. "ŝlosil-ringoj", kiuj posedas medalon kun la kongresa emblemo. Certe post mallonge ni povas legi en HdE aŭ en revuo "esperanto" detalojn pri filatelaj k.a aliaj memoraĵoj.





GLUMARKOJ - GLUMARKOJ

---Nur datumitajn glumarkojn ni estonte citos---

La Hirsch-atentigo pri nedatumitaj en LVL 81 surprizis ankaŭ min, ĉar por n-ro 81 estis en la manuskripto tuta paĝo de glm-notoj. Plej parte temis pri propagandaj, nedatumitaj glm. Komprenеble mi subtenas la opinion de Hirsch, noti nur datumitajn glm-n. Tiel agis jam Jensen. Do, jen nun kelkaj informoj:



Internacia Festivalo pri Turismo, Komunikado kaj Kulturo 11-19 Oktobro 1987 en Karakaso/Venzuelo. (Terglobo-verda stelo)

Ni ricevis informojn pri jenaj glumarkoj (bildoj sekvos en LVL 4):

49a argentina NK (informo de Belucci)

Festivalo de Internacia Kulturo (ronda 1990) (de Radnai)

Fervojista E-Renkonto Zalaegszeg 1990 (de Radnai)

Aperis ankaŭ dua gm por la 75a UK en Havano (C).











Ni gratulas al nia
En junio la fariĝis
1968, naskiĝjaro de
nia prezidanto kaj jam
tras nian klubon. Ni tre
re agadas por nia afero.
vicojn de la gratulantoj
ĉion bonan!

Ivar Paulsson.
75-jara. Ekde
AREK, li estas
tra 22 jaroj es-
ĝojas, ke li daŭ-
Ni envicigas en la
kaj deziras al li



ANONCOJ - ANONCOJ

Li Liang, P.O.Box 111-8, TJ-110 044 Shenyang, deziras interŝanĝi E-filatelaĵojn kaj pm`n kun naciaj flagoj. Li estas 25-jara policisto, partoprenis Pekinan UK.

*0*0*0*0*0*0*0*0*0*

Anonco pri glumarkoj


Folieto kun 12 rondaj memgluaj glm kun bildo de la ĉina pm haveblas ĉe Triesta Esperanto-Asocio -C.P. 601 - I-34100 Trieste Centro, Italio. (1 folieto kostas 1.500 lirojn, 10 folietoj: 12.000 lirojn). Dankon pro informo de Elda Dörfler en Trieste!



Pssst...silentu, la redaktoro jam preparas LVL No. 4.

Informilo de ELF-AREK
Esperanto Ligo Filatelista
Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj

Redakcio ĉe:	Rudolf Burmeister, W.-Firl-Str. 30, Chemnitz, DDR-9047
Prezidanto-Kasisto:	Ivar Paulsson, Skyttcholmsvägen 29 S-171 44 Solna
Poŝtĝiro-Konto:	51 57 85 -4, I. Paulsson, Solna (S)
Kotizoj por 1990:	60 SEK (10 US$ aŭ 20 IRK)
Stampobanko:	Werner Heimlich, Fröbelstr. 4, D-3040 Soltau
Kompostis + Ekspedis:	Richard Hirsch, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld



Nova! KATALOGO DE LA ESPERANTO-FILATELIO

Ekde 1989 ekzistas nova katalogo, en nebindita formo, de nia fako. Ĝis nun aperis jenaj partoj, kiujn mi ĉiujare, komence de nova jaro, ĝisdatigos:

1	la specialaj poŝtaj stampoj (enhavas la stampojn, la stampbildojn, la prezojn laŭ valorpunktoj kaj la IPA-stampojn)	DM 25,-- (18 IRK)
2	la poŝtmarkoj (kun "krome ekzistas...)	DM 18,-- (13 IRK)
3	la glumarkkatalogo ĝis la jaro 1970, laŭ la 2a eldono Jensen.	DM 14,-- (10 IRK)

Aperos ankoraŭ:

la tutaĵkatalogo

kaj la superrigardo laŭ temoj

Ambaŭ ekzistas ĝis nun nur en kruda manuskripta formo. Espereble la tutaĵparto aperos ĝis fine de 1990 kaj la alia parto nur dum printempo 1991.

Vi povas ricevi ĉiujn partojn unuope, sed kune ili kostas DM 50,-- = 36 IRK. Se vi bezonas ordigilon, tiam altiĝas la prezo al DM 60,-- = 43 IRK.

Mendu ĉe:

Richard Hirsch, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld,

Postgirokonto Frankfurt/M., konto-no: 3308 95-69.